

## Esperanto en la Universitato de Clermont-Ferrand

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-852/347, 1980 februaro 07 kaj 09

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-53/SRI-1980-53-A-2-347-852-1980-02-07-09-Claude-kaj-Andree-Gacond-Esperanto-en-la-Universitato-de-Clermont-Ferrand.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Aperis en la organo SAT-Amikaro, numero 350-a, novembro 1979, tre interesa raporto de Pierre Janton pri la 10-jara eksperimento de instruado de Esperanto en la Universitato Clermont-Ferrand en Francio. Ni hodiaŭ legos al vi erojn el tiu dokumento, kiu bone montras kiel malfacile estas definitive firmigi la akiritajn poziciojn de Esperanto kaj tiom ili fakte dependas de la sindonemo de la esperantistoj mem. Ni do citas el la raporto de Pierre Janton :

A.- Antaŭ dek jaroj komenciĝis en la universitato de Clermont-Ferrand (filologia fakultato) la unua oficiala Esperanto-kurso en Franca universitato. Ĝi naskiĝis en la optimisma kaj inventema etoso, kiu regis en multaj instruejoj post 1968 kaj favoris ĉiujn science kaj socie novigajn iniciativojn. Kiel multaj aliaj por-Esperantaj entreprenoj, ĝi fontis el individua agado kaj tial mi devos paroli en mia propra nomo kaj kun certa grado da subjektiveco. Kolektinte informon pri la Esperanto-instruado en eksterlandaj altlernejoj mi submetis projekton al la fakultataj instancoj, kiuj ekzamenigis ĝin de pedagogia komisiono kaj poste akceptis ĝin kiel eksperimenton daŭrigotan laŭrezulte.

Cl.- Tujan apogon donis la kolegoj, kiuj jam simpatiis kun la interna ideo de neŭtra internacia lingvo kaj komprenis la sciencan kaj praktikan valoron de Esperanto. Ĉar ili estis ŝufiĉe nombraj en la fakultata estraro, la projekto estis rapide akceptita. Tamen, eĉ dum tiu prakomenca fazo, venis du mirigaj reagoj el kelkaj flankoj. Eble la lokaj lingvistoj divenis, ke Zamenhof ne tro ŝatis iliajn samfakulojn, ĉar ili donis sian helpon kaj konsenton gutete. Ekzistis tamen alia konjektebla kaŭzo: por respondi jese aŭ nee al la projekto, ili estus devintaj informiĝi pri Esperanto, sed lingvistoj ĝenerale ne emas fari tion. Aliatipa, pli amuza reago montris, kiel la plej kleraj inter la dupieduloj uzas sian penskapablon por defendi siajn antaŭjuĝojn. Dezirante pruvi al la instancoj, ke Esperanto ne indas eniri la universitaton, iu profesoro petis Parizan lingviston provizi lin per argumentoj kontraŭ Esperanto. La respondo estis kate prudenta, kaj evitis la lingvistikan terenon.

A.- Tamen nek aktiva nek silenta malaprobo sukcesis subfosi la pozitivan sintenon de la instancoj. La kurso komenciĝis en oktobro 1969. La anonco ricevis ĝeneralan aprobon inter la ne-Esperantista publiko. Nur unu protestis laŭte kontraŭ tiu «entrepreno de mensa malpurigo». La gazetaro disvastigis la novaĵon dank al la klopodoj de Francaj Esperantistoj. Mi bedaŭras, ke inter la Esperanto-publikadoj la revuo «Esperanto» menciis ĝin per tiel diskreta artikolo, ke ĝi ne kaptis la atenton eĉ de la redaktoroj de «Esperanto en Perspektivo».

Cl.- Jen kiel Pierre Janton priskribas la celon kaj kadron de la kurso. Ni citas lin.

A.- Ekinstruante Esperanton, mi metis antaŭ min nek alte sciencan nek alte idealisman celon. Mi konsideris ĝin kiel esence racian kaj praktikan komunikilon kun grandega civilizacia potencialo. Ĉar ĝiaj avantaĝoj mem-evidentiĝas per praktikado, mi ne strebas pruvi teorie ĝian lernindecon, sed celas diskonatigi ĝin inter ĝejnuloj, por ke ili mem malkovru ĝiajn admirindajn ecojn. Oni povas pristudi ĝin el diversaj vidpunktoj: lingva, lingvistika, psikologia, socia, politika, filozofia, ktp. Je neniu el ili mi deziras min limigi, ĉar ili ĉiuj

konsistigas vivantan tutaĵon. Tiel difininte la celon, ni rigardu la praktikan kadron de la kurso. Kvankam oni ĝenerale ne plu konsideras ĝin kuriozaĵo, kaj ĝi famas pli bone ol kelkaj aliaj kursoj, ĝi renkontas tri gravajn barojn al sia progreso.

Cl.- 1. La unua estas leĝa kaj administracia. La ministeriaj dekretoj kaj aktoj pri mezlerneja kaj altlerneja lingvo-instruado ne metas Esperanton inter la oficiale instrueblajn lingvojn, sed inter la nedevegajn, apudfakajn lernobjektojn. Kiam en 1970 la fakultata estraro provis enŝovi ĝin en la vicon de la elekteblaj duaj lingvoj, tuja ministeria reago memorigis, ke tio estas kontraŭleĝa. Ĉu universitato povas nun rigardi tiun vetoon kaduka surbaze de la principo de universitata aŭtonomio, estas ankoraŭ nedecidite. Krome, ec, se Esperanto estus agnoskita kiel eiektebla dua kaj - kial ne - unua lingvo, la apliko de tiu agnosko al la praktiko renkontus tujan baron.

A.- 2. Ĝi estas la fakto ke la tuta instruado kaj la ĉi-rilataj organizaj kaj pedagogiaj taskoj ripozas sur la ŝultroj de nur unu persono, jam multe ŝarĝita per la multflankaj devoj kunligitaj kun lia prianglistika katedro.

Cl.- 3. Ne aperas signoj, ke la situacio baldaŭ ŝanĝiĝos. Jam en 1975 pro financaj kaŭzoj multaj radiokursoj ĉesis, inter kiuj troviĝis la Esperanto-kurso. Nun la ekonomia situacio tiel malpliboniĝis, ke la Esperanto-kurso ne plu ricevas monsubvencion. La kursgvidanto ne estas salajrita kaj la necesajn elspezojn (roneo, abonoj, poŝto, libroj, ktp) devas porti la kursanoj kaj la instruistoj. Kvankam unu plia instruanto estus nepre necesa por disvolvi kaj plibonigi la kurson, estas apenaŭ espereble, ke troviĝos kompetenta sindonemulo por labori kvar aŭ ses horojn semajne sen pago.

A.- Pri la nuna situacio Pierre Janton diras: ĝi intime dependas de la ĵus priskribitaj cirkonstancoj. La gestudentoj rajtas elekti Esperanton kiel trian lingvon en tiuj branĉoj, en kiu tria lingvo estas elektebla, aŭ kiel apartan fakon por kompletigi sian kursaron. Tiu aparta fako estas nomita «kursero» (Unité de valeur - mallonge U.V.) en la unua studciklo. Kaj «Instruunuopo» (Unité d'Enseignement - mallonge U.E.) en la dua. Ekzistas krome trigrada diplomo (Attestation d'Etudes) destinita ĉefe al eksteruniversitataj.

Cl.- Pierre Janton en tabelo montras, ĝis nun 365 studentoj sekvis liajn Esperanto-kursojn en la Universitato Clermont-Ferrand. Malgraŭ tio la situacio ne vere pliboniĝis. Ni citu lian konkludon:

A.- Rigardate el la vidpunkto de la kolegaro, la situacio de Esperanto ne vere pliboniĝis. La plejparto alkiutimiĝis al la ne ĉiam senbrua estado de la kursoj kaj ties fojfoje provokaj propagandiloj. La pri-Esperantaj informiloj ne plu estas tiel ofte forŝiritaj, kiel antaŭe. Sed Esperanto ankoraŭ ne estas rigardata kiel plenrajta studobjekto kun la sama valoro kaj honoro, kiel la tradicie establitaj fakoj. Kelkaj kolegoj informiĝis, sed neniu lernis. Kun iom da ruzo kaj sagaco oni povas ŝanĝi stultan kontraŭpropagandon al efika propagando. Sed glacian senintereson oni ne povas varmigi al fervoro. De jaro al jaro la modesta subvencio malgrandiĝis kaj fine malaperis profite al aliaj fakoj, kies utilon neniu aŭdacas pridemandi. Post dek jaroj Esperanto restas individua afero kaj konjekteble multaj opinias, ke la kurso pludaŭras nur pro la distrado de la instruanto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la 10-jara eksperimento Esperanto en la Universitato Clermont-Ferrand. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*